

Konversacio kun Christian Castillon, 3.

Leterkesto.

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1986.01.30

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-162/Radiokasedo-162-3-86-A-1009-Claude-kaj-Andree-GACOND-Konversacio-kun-Christian-Castillon-kaj-Leterkesto.mp3>

Cl.- Vi aŭdas elsendon de Svisa Radio Internacia. Parolas Claude kaj Andrée GACOND. Unue ni aŭdigos al vi hodiaŭ la reston de tre interesa babilado, kiun mi havis kun la mondmigranto, Christian Castillon. Jam dum la du pasintaj semajnoj vi povis aŭdi lin pri siaj vojaĝoj. Poste ni malfermos la leterkeston kaj ni babilos kun la skribemaj geaŭdantoj. Do, nun, aŭskultu Christian Castillon.

Christian Castillon, do vi multe vagabondis, vojaĝis, gastigis, ĉu vi reciprokis tion ?

CC.- Kompreneble. Mi unue aliĝis al Pasporta Servo, tiu listo de gastigantoj kaj mi ricevis gastojn kaj kiam oni loĝas proksime de la maro, ili venas somere kaj tio estas tre, tre agrabla. Mi povas montri, malkovri al ili plaĝon, strandon, kiu estas pli intima, pli intimaj kun malpli da turistoj kaj eĉ oni povas iri piede aŭ bicikle. Precipe mi ricevis hungarojn, mi memoras, iam en la eta loĝejo ni estis kvin. Kaj estis tre tre agrabla. Ankaŭ germanoj, motorciklisto venis kaj tiel mi redonas tion, kion mi ricevas, kiam mi vojaĝas.

Cl.- Do, vi ne necese revenas al la samaj.

CC.- Ne.

Cl.- Do tiu Paspoprta Servo, do estas speco de, ni diru, asekuro por vojaĝi ? Ĉu ne ?

CC.- Jes, do, oni povas skribi antaŭe, tiuj kiuj ŝatus bone scii, do, mi estas certa, tiun nokton mi estas ĉi tie kaj mi povas tranokti ĉe iu. Sed ankaŭ oni povas telefoni lastmomente, tio okazis, kaj estas eble pli agrabla, oni povas improvizi sian vojaĝon, resti unu tagon pli ie aŭ malpli alie.

Cl.- Jes, kaj se oni biciklas, la pluvo ludas gravan rolon.

CC.- Jes, kompreneble, jes. Se pluvas do oni restas, oni foriras, kiam la pluvo estas for.

Cl.- Do, vi devas pagi iomete, kiam vi venas ĉe tiuj gastigantoj.

CC.- Do, mi persone pagas la manĝadon, kompreneble, kaj prezenton mi donas, donacas prezenteton.

Cl.- Ĉu kelkfoje oni invitis vin al grupo ?

CC.- Grupo ... ne vere. Jes, jes, esperanta grupo. Mi tre aprezis tiun grupon de Trieste. Kie ili neniam krokodilas kaj tre altnivelaj, ili kunvenas dufoje semajne, ekzemple. Jes, ĉiam, kiam mi povas, eĉ mi daŭrigis mian restadon por partopreni iun esperantan renkontiĝon. Ĉiam, kiam mi povas, la loka grupo tre interesas min.

Cl.- Do, nun vi estas kiom jara en esperanto?

CC.- Do, mi komencis dum la jaroj sepdek, sepdekkvin, sepdekses, sed miaj studadoj forlasiĝis tiam, kaj nun mi povas diri ke mi estas kvar jara.

Cl.- Kie vi komencis?

CC.- Do, mi komencis en Toulon studi, staĝi kaj mia unua renkontiĝo estis apud Toulon, en Aix-en-Provence, ĉiam apud Marseille. Estis franca-germana renkontiĝo, kaj mia unua amiko estis germana amiko. Kaj tio estas tre plaĉa, ĉar dum multaj jaroj germanoj kaj francoj estis malamikoj. Kaj do li restis mia plej granda esperanta amiko.

Cl.- Kaj, vi parolis pri Aix-en-Provence, ĉu vi studis ankaŭ en la kurso de la universitato ?

CC.- Jes, kompreneble, kiam mi volis lertiĝi pri vere regi la lingvon, post tiu facila lernado, ĉar mi ne volis tro studi unue, estas ĉiam malfacila lerni lingvon, do per la vojaĝo eksterlande, kiam oni devas vere lerni, oni aŭdas kaj ripetas, kaj estas multe pli facila lerni praktike. Sed poste oni tamen devas vere profundigi en la lingvo, kiam oni volas regi kaj pensi en ĝi. Kaj tiel mi iris al la universitato de lingvoj en Aix-en-Provence, kiel eksterlanda, ne eksterlanda, fremda studanto, kaj mi sekvis la kursojn de s-ro Luc Goninaz kaj de Daniel Moirand kaj mi trapasis miajn du 'valorajn unitojn', kaj do sukcese, sen mencio, sed tamen sukcese.

Cl.- Kaj vi iomete studis en La Chaux-de-Fonds ?

CC.- En La Chaux-de-Fonds, ankaŭ, jes. Sed antaŭ La Chaux-de-Fonds mi studis ankaŭ en Grésillon, kaj do poste ankaŭ en Löwen, estis mia unua junulara renkontiĝo en Belgio, kaj kompreneble poste en La Chaux-de-Fonds mi restadis, partoprenis semajnfinojn kaj semajnon de studado.

Cl.- Post tiu konversacio kun s-ro Christian CASTILLON ni remalfermu nian leterkeston por daŭrigi la salutadon al la aŭdantoj, kiuj skribis al ni en la pasinta jaro. Ni ordigis la korespondaĵojn laŭ la alfabeto ordo familinoma.

Ni salutu en Francio s-rojn Michel DARTIGE en Rennes, R. DESPUJOLS en St Léonard de Noblat, E. DIETZ en Strasbourg, Jacques D'ONY en La Ricamarie, Pascal DUBOURG en La Maine Maromme kaj Juliano DUCROCQ en Calais, kiuj sendis aŭdraportojn. Ni ne povas skribi al s-ro J. DEREDEC, kiu informiĝis, ĉu ekzistas aĉeteblaj surbendigoj de niaj elsendoj, ĉar lian adreson ni ne povas legi. Ni profitas la okazon por peti la skribontojn ĉiam treege legeble skribi siajn nomojn kaj adreson.

A.- Koncerne la registradon de la elsendoj de Svisa Radio Internacia ni raportu, ke kolekto konserviĝas ĉe Kultura Centro Esperantista. Espereble kopioj estos foje pruntriceveblaj de interesatoj. Sed kiel por ĉiu nova agado, ni lanĉos ĝin nur kiam ni povos kalkuli je la regula helpo de loka kunlaboranto. Ni tutcerte informos vin, se foje tiu ĉi servo de perkoresponda pruntoricevo de kopioj de radio-elsendoj povos funkcii.

Cl.- En Belgio s-ro Wim DE SMET en Kalmthout aŭskultis la intervjuojn, kiujn ni realigis kun li okaze de lia restado en Svislando. Pluraj aŭdantoj diris sian intereson por liaj rakontoj pri la vivo de la balenoj. En Italio ni salutas s-ron Stefano CLARA en Roma, en Nederlando s-ron Bert DE WIT en Humstede kaj en Svislando s-rojn Pierre DORTHE en Lausanne kaj

Aldo DUTTO en Vevey. Tiu lasta estas konvinkita, ke la teknikaj progresoj en interkomunikado plisentigos la bezonon de interkomunika lingvo. Li opinias, ke elsendoj en esperanto havas tre gravan edukon rolon, ĉar ili helpas multajn homojn progresi en la uzo de internacia lingvo vere neŭtrala.

El Pollando ni ricevis du leterojn de s-ro Torvid EDVARDSEN en Szczecin, kiujn ni volas parte citi. En la unua nia pola aŭskultanto skribas:

A.- "Mi ĝis nun apartenis al tiu "silenta aŭskultantaro", kiu neniam skribas al vi. Tamen mi depost pli ol 20 jaroj aŭskultas vin, eĉ en diversaj partoj de la mondo dum miaj vojaĝoj kiel maristo..."

Cl.- En dua poŝtkarto s-ro Torvid EDVARDSEN skribas:

A.- "Mi dankas pro afabla respondo koncerne la Gastejon Edmond Privat, kiu atingis nin tra viaj radioondoj. La informoj utilas al ni samkiel al aliaj viaj aŭskultantoj. Ni serioze pripensas veni somere al La Chaux-de-Fonds... Mian informpeton mi sendis al vi antaŭ multaj monatoj kaj mi jam estis perdinta esperon ricevi respondon, kiam subite kaj bonŝance mi enŝaltis la radioricevilon por aŭdi vian programon, ĝuste tiun tagon tre bone aŭdeblan. Kiel kutime, mi surbendigis ĝin. Nu, estis granda surprizo..."

Cl.- Espereble s-ro Torvid Edvardsen denove aŭdas nin hodiaŭ. Al lia informpeto pri la ebleco veni helpi en La Chaux-de-Fonds al la funkciigo kaj konstruo de Gastejo Edmond Privat ni respondu tion:

A.- Kultura Centro Esperantista donas la eblon gastigi senpage, al esperantistoj el landoj nomataj nepagipovaj. La koncernatoj devas esti pretaj plenumi manlaboron dommastruman aŭ konstruan.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND diras al vi: ĝis reaŭdo!